DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 4 (925) • 2017 •

## Ekumena diservo en Seulo

dum Universala Kongreso, kun pastoro Leif Nordenstorm kaj (dekstre irante) Maria Belošević.
La eksteraĵo de la preĝejo, (p.90)
/Fotis Benata Hengstmengel-Koopmans





Kongresaj partoprenantoj antaŭ la kongresejo Hüttstattmühle, p.79



**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +(0)420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO
**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Konstrui vian vivon sur la rokon | 75 |
| La donindaj pli bonaj aferoj | 78 |
| Raporto de la KELI-kongreso | 79 |
| La religia fido de la prasciencistoj | 84 |
| Kristana unueco aŭ eklezia ekumenismo | 86 |
| Ekumenaj renkontigoj dum la 102a UK en Seulo, Koreio | 90 |
| Kristanoj en la nuna malagasa socio | 91 |
| Laste aperis 3 libroj | 92 |
| Protokolo de KELI-jarkunveno | 93 |
| Nekrologo - Leen Hordijk | 95 |
| Serĉi, demandi | 93 |

## Redaktoraj vortoj

Espereble vi ĉiuj havis interesan kaj varmigan kaj ripozodonan kaj ĝojplenan someron. Ĉi-numero, laŭtradicie, vi povas legi raporton pri nia KELI-kongreso en Germanio kaj protokolo de la jarkunveno, sed ankaŭ raporton pri la diservo kaj faka kunsido dum UK. Krome troviĝas diversspecaj artikoloj, kiujn, mi esperas, vi trovos interesaj.

Paralele kun la preparado de la gazeto mi ankaŭ preparis min por la fina ekzameno en Poznan. Tio kaŭzis la malfruon de la gazeto. Mi esperas je via toleremo. Multon mi lernis dum la 3 jaroj. La studoj vekis mian intereson al daŭra legado de esperanta literaturo. Vere ekzistas multaj bonaj libroj kiuj estas taŭgaj helpiloj por evoluigi la lingvoscion. Ankaŭ vi legu! ☙

# Konstrui vian vivon sur la rokon ...

## Prediko en Zöblitz okaze de la KELI-kongreso

Philippe Cousson, FR

> 24 Tial ĉiu, kiu aŭdas ĉi tiujn miajn parolojn kaj plenumas ilin, estos komparata al saĝa viro, kiu konstruis sian domon sur roko; 25 kaj falis pluvo, kaj venis inundoj, kaj blovis ventoj, kaj albatis tiun domon, kaj ĝi ne falis; ĉar ĝi estis fondita sur roko. 26 Kaj ĉiu, kiu aŭdas ĉi tiujn miajn parolojn kaj ne plenumas ilin, estos komparata al viro malsaĝa, kiu konstruis sian domon sur la sablo; 27 kaj falis pluvo, kaj venis inundoj, kaj blovis ventoj, kaj sin ĵetis sur tiun domon, kaj ĝi falis; kaj granda estis ĝia falo.
>
> Mateo 7:24-27

La supraj versikloj el Mateo estas la hodiaŭa teksto por la prediko. En tiuj Jesuo admonas siajn aŭskultantojn.

Eblas diri, en nuntempaj vortoj, ke la Biblio estas hiperteksto, kie senĉese troviĝas ligiloj al aliaj tekstoj. Estas hodiaŭ la kazo. Kaj helpiloj kiel notoj, paraleloj aŭ konkordancoj estas ĉi tie altvaloraj. Eblas diri ankaŭ en sama kunteksto ke la Biblio estas ĝia propra interpretisto.

Jen do rakonteto, kiel infankanteto, konstruita kun ripetoj, simetrioj kaj notindaj diferencoj. Ĝin oni muzikigis. Mi lernis ĝin en dimanĉa lernejo, sed ĝi fariĝis popola kanto en Ĉeĥio, sen konscia rilato al la biblia referencaro. Kaj al ĉi tiu himneto estas kunigitaj gestoj.

Du homoj, saĝulo kaj frenezulo. Iel kiel en la parabolo de la dek junulinoj. Tiuj ĉi du homoj konstruas ĉiu sian domon. Apriore la saĝulo kondutas bone kaj la frenezulo malbone.

Ni rimarku kelkajn punktojn. Kion mi diros, tio aspektos al vi eble iom senorde, sed ĉi tiu teksto postulas aliron el ĉiuj flankoj.

Kiel en la rakonto de Jeĥezkel, la pluvo, la torentoj, la vento, estas prezentitaj kiel elprovo, ne en la signifo de io malfacila, dura, sed kiel io kio provas, kio testas, kio kontrolas la solidecon, la efikecon, la verecon.

La teksto el Jeĥezkel prezentas al ni parabolon por priskribi la sintenon de la ĉefoj de la popolo en la tempo de la profeto. La muro kiun konstruas la popolo ne estas perfekta. Tiam la respondeculoj, la falsaj profetoj ŝmiras ĝin per maltaŭga mortero, per gipso, per kalko. Kiam ili finis, la muro aspektis bela, firma, solida. Venas la elprovo, la

torenta pluvo kaj la hajleroj kaj la ŝmiraĵo estas forigita, kaj la muro mem estas renversita. Kaj eĉ la fundamento estas malkovrita kaj detruita. Jen bildo pri la sorto kiu atingos la popolon kaj ĝiajn respondeculojn, pro tio ke ili ne volis aŭskulti la Sinjoron kaj liajn profetojn.

La aŭskultantoj de Jesuo kaj la legantoj de Mateo tre certe konas tiun ĉi pecon kaj rapide faras la ligon. Neniu bezono por ili alklaki.

Tie ĉi oni parolas pri konstruado de domo. Kiam temas pri konstruado, tuj tiu ĉi vorto aperas subskribita kaj celas al la Psalmo 127:

> *Se la Eternulo ne konstruas la domon, Tiam vane laboras super ĝi ĝiaj konstruantoj; Se la Eternulo ne gardas urbon, Tiam vane maldormas la gardanto. Vane vi frue leviĝas, malfrue sidas, Manĝas panon kun klopodoj: Al Sia amato Li donas en dormo.*

Tiel prezentiĝas jam bona ideo pri kio estas bona konstruaĵo. Estas tiu, kiun Dio mem konstruas.

Kaj la sinteno de la saĝulo plusendas tuj la leganton, la aŭskultanton al peco en Jesaja, ĉapitro 28:

*Dio ordonas en la 13a ĉapitro de la libro de la profeto Jeĥezkel prediki la sekvan:*

10 Pro tio, ĝuste pro tio, ke ili erarigas Mian popolon, antaŭdirante pacon, kvankam paco ne estos, kaj kiam la popolo konstruas barilon, ili ŝmiras ĝin per maltaŭga mortero – 11 diru al tiuj, kiuj ŝmiras per maltaŭga mortero, ke ĝi defalos; estos pluvego, kaj vi, ŝtonoj de grandega hajlo, falos sur ĝin, kaj forta vento ĝin krevigos. 12 Kaj jen la muro falis; ĉu oni ne diros al vi: Kie estas la mortero, per kiu vi ŝmiris? 13 Tial tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Mi elpuŝos fortan venton en Mia indigno kaj pluvegon en Mia kolero kaj ŝtonojn de hajlo en Mia furiozo, por ĉion ekstermi. 14 Mi detruos la muron, kiun vi ŝmiris per maltaŭga mortero, Mi disŝutos ĝin sur la teron tiel, ke nudiĝos ĝia fundamento; kaj ĝi disfalos, kaj vi pereos meze de ĝi; kaj vi ekscios, ke Mi estas la Eternulo. 15 Kaj Mi plene kontentigos Mian koleron sur la muro, kaj sur tiuj, kiuj ŝmiris ĝin per maltaŭga mortero, kaj Mi diros al vi: Jam ne ekzistas la muro, kaj jam ne ekzistas tiuj, kiuj ŝmiris ĝin. 16 Tiaj estas la profetoj de Izrael, kiuj profetas pri Jerusalem, kaj predikas al ĝi vizion pri paco, kvankam paco ne estos, diras la Sinjoro, la Eternulo.

Jeĥezkel 13:10-16

> *Pro tio tiele diris la Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi por fundamento kuŝigas ŝtonon en Cion, ŝtonon elprovitan, bazangulan, valoregan, fortikigitan fundamenton; la fidanto ne maltrankviliĝu. Kaj Mi faros justecon la mezurŝnuro, kaj veron la vertikalo; kaj hajlo forbatos la rifuĝejon de mensogo, kaj la kaŝejon forportos akvo.*

Ĉi tie troviĝas jam la fundamento, sur ŝtono, sur roko, kaj ankaŭ la minacantaj elementoj, hajlo kaj akvo por elprovi la konstruaĵon. Sed ankaŭ troviĝas io, kion reprenos la Nova Testamento, la bazangula ŝtono. Bazangula ŝtono retroveblas ankaŭ en la 118a psalmo:

*Ŝtono, kiun malŝatis la konstruantoj, Fariĝis ŝtono bazangula.*

Kaj kiam mi plue alklakas tiun ĉi hiperteksto, kiu estas la Biblio, mi alvenas al Agoj 4: *Tiu estas la ŝtono, kiun vi konstruantoj malŝatis, kaj kiu fariĝis ŝtono bazangula.* Tie, temas pri Jesuo.

Precizigon plie alportas tiu peco de Paŭlo en la epistolo al la Efesanoj, ĉapitro 2:

*Sekve vi jam estas ne fremduloj kaj pasloĝantoj, sed samregnanoj kun la sanktuloj, kaj el la domanaro de Dio, konstruitaj sur la fundamento de la apostoloj kaj profetoj, kies bazangula ŝtono estas Kristo Jesuo mem; en kiu ĉiu aparta konstruaĵo, bone kunigita, kreske fariĝas sankta templo en Kristo; en kiu vi ankaŭ estas kunkonstruitaj por sanktejo de Dio en la Spirito.*

La fundamenton de la domo de Dio konsistigas la apostoloj kaj la profetoj, tio estas la atesto de la apostoloj kaj profetoj, tio estas la Skriboj. Sed la peco precizigas plie ke la bazangula ŝtono estas Jesuo Kristo, ankoraŭfoje.

Post zapado de versiklo al versiklo, de ligilo al ligilo, ni tuj revenas al niaj kvar versikloj, sed vi povos konstati ke tiuj devojiĝoj ne estis senutilaj.

La slogano de la Reformacio, *Sola Scriptura*, rememorigas nin ke la fundamento sur kiun konstruiĝas la Eklezio, la vivo de ĉiu kristano, tio estas la atesto de la apostoloj kaj profetoj, tio estas la Skriboj, sed la Skriboj en tio ke ili montras al la bazangula ŝtono, al Jesuo Kristo. Same sur konata bildo Wycliff estas prezentita kiel la fajrilo, Jan Hus kiel la meĉo kaj Martin Luther kiel brulanta torĉo: ili estas tiuj, kiuj permesis al ĉiu ajn aliri por si mem al tiu fundamento, sin apogi al tiu ĉi roko kaj konstrui sur firman rokon.

Komentario de Luther pri tiu peco komparas tiujn, kiuj baziĝas sur sablo kun tiuj, kiuj konstruas al si memfaritan sanktecon, konstruitan sur siajn propajn agadojn, sur sian devotecon aŭ siajn intencojn, sed konas nenion pri Kristo. Li parolis pri la tiuepokaj monaĥoj, sed tio validas ankaŭ ĝenerale. Pretendi fabriki sian savon, memfari siajn valorojn, serĉi meritojn, ĉio ĉi estas same vana kiel konstrui sur sablon, kaj ne eltenos la elprovojn de la vivo, ne pli efike ol la ŝmiraĵo de maltaŭga mortero al la mureto de Jeĥezkel.

Niaj kvar versikloj respondas unu al la aliaj preskaŭ perfekte. Nur kelkaj vortoj modifas la du duonojn. Sablo kaj roko. La falanta kaj la nefalanta domo, la saĝulo kaj la malsaĝulo.

Mi kromnotos aliajn diferencojn.

La verboj aŭdi kaj fari, aŭdi la parolojn de Jesuo kaj fari ilin (diversmaniere tradukita plenumi aŭ praktikigi) ne estas en la sama gramatika modo en la du partoj. Kaj en tio mi vidas signifon. En la unua parto de la diptiko, tiu de la saĝulo, tiuj verboj estas en indikativa modo: temas pri agado, intenco, pozitiva agado. Tiu ĉi vere aŭdas, aŭskultas atente, kaj li faras vere, efektivigas la parolojn, realigas ilin.

Kontraŭe en la dua bildo de la sama diptiko, tiu de la malsaĝulo, la verboj estas en participa modo. Iamaniere li pasivas, li aŭdas sen aŭskulti, pasante,

distre, sen intenco, sen streĉo, kaj sekve ne faras, ne agas, ne realigas, ne plenumas tiujn parolojn. Li ne troviĝas ĉi tie. Li rigardas aliloken, li aŭskultas aliloken, li agas alimaniere.

Estas alia diferenco kiu kondukas al la sama ideo kaj kiun la tradukoj ne ĉiam redonas. Ne estas la sama verbo kiu estas uzata por priskribi la agadon de la elementoj.

La unua verbo povas estis tradukita per *sin ĵetis*, kaj eĉ portas la signifon *(ador-)kliniĝi*. La elementoj devas strebi por ataki tiun ĉi domon konstruitan sur la roko, sed ili devas kapitulacii, eĉ kliniĝi antaŭ tiu ĉi domo kaj antaŭ la roko.

La alia atako aspektas malpli intenca. Eblas diri ke la senbridaj elementoj frapiĝas kontraŭ la domo, aŭ eĉ ili stumblas sur ĝi. Ŝajne, ĝi ne estis celita. Sed ĝi ne eltenis. Ĝi preskaŭ detruiĝis de si mem, ne estinte bone konstruita. Iamaniere, la elementoj detruis ĝin malatente. Ups !

Kion reteni el tiuj versikloj, klarigite per aliaj versikloj ?

Unue, konstrui sian vivon sur la rokon, sur la ateston de la apostoloj kaj de la profetoj, sur la Skribojn, kiuj parolas al ni pri Jesuo Kristo, kaj ne malatente, ne sur niajn bonajn intencojn, nian racion, ne nur aŭdi aktive sed ankaŭ praktiki, plenumi, fari kaj vivi ĉi tiujn parolojn.

Kaj ankaŭ ne timi la elprovon. La tento estas la sama vorto, ofte mis-komprenata. Tiu, kiu konstruis sur la rokon, ne timas la elementojn, kiuj elprovas foje forte la solidecon de la konstruaĵo.

Mi finos per citaĵo de la apostolo Petro, kiu citis Jesajan:

> *Jen Mi kuŝigas en Cion bazangulan ŝtonon, elektitan, valoregan; Kaj kiu lin fidas, tiu ne estos hontigita.*

Amen

---

# La donindaj pli bonaj aferoj

Honoré SEBUHORO

| | | |
|---|---|---|
| Al Dio: | la amo kaj la sindono | Romano 8:12 |
| Al via malamiko: | la pardono | Johano 20:23 |
| Al via kontraŭulo: | la toleremo | Genezo 30:20 |
| Al via amiko: | la sincereco | Agoj 2:46 |
| Al via patro: | la obeo | Romano 6:16 |
| Al via patrino: | a humileco | Cefanja 2: 3 |
| Al via edzo: | la submetiĝo | Psalmoj 49:14 |
| Al via edzino: | la amo | Koloseanoj 3:19 |
| Al via infano: | la afableco | Galatianoj 5:22 |
| Al via kapo: | la respekto | Efesanoj 5:33 |
| Por ĉiuj: | la paco ........ !!!! | 2 Korintanoj 13:11 |

# La 67-a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia
## Zeblico, 7.-14.8.2017

Raportis Oldřich Arnošt Fischer kaj Gabriella Stier

Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) estas societo, kiu estis fondita en la jaro 1911. Celo de KELI estas krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo. Oficiala organo de KELI estas dumonata revuo Dia Regno, kiu estis fondita en la jaro 1908 (ISSN 0167-9554).

La 67-a Kongreso de KELI okazis en germana urbeto Zeblico (germane: Zöblitz) ekde la 7-a ĝis la 14-a de aŭgusto 2017. En kongresejo 26 kredantaj esperantistoj el 8 eŭropaj landoj (Aŭstrio, Ĉeĥa Respubliko, Estonio, Francio, Germanio, Hungario, Rumanio kaj Svedio) renkontiĝis, por kune preĝi, ĥore kanti, prelegi, lerni kaj diskuti pri la temo „Fruktoj de reformacio“.

La kongresejo estis eklezia eduka centro Hüttstattmühle, Ansprung.

**Marde**, la 8-an de aŭgusto 2017, post matenmanĝo, komuna kantado kaj diservo, kiun gvidis Václav Pospíšil, prezidanto de KELI Philippe Cousson oficiale inaŭguris la kongreson kaj prelegis pri eklezia reformacio. Li rememorigis signifon de John Wycliffe (1320-1384), Martin Luther (1483-1546), John Wesley (1703-1791), Mary Jones (1784-1864) kaj aliaj.



Estraranoj (Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Siegfried Krüger, Wolfram Rohloff, Pilippe Cousson interparolas /VP

Siegfried Krüger prelegis pri „Fruktoj de reformacio“ uzante bildojn de germana pentristo Lucas Cranach la Pli Aĝa (1472-1553).



Posttagmeza kaftrinkadao /VP

Partoprenantoj kun ega intereso aŭskultis prelegon de Endel Ojasild “Reformacio en Estonio”.

Post interkona vespero, gvidis Ágnes Ráczkevy-Eötvös vesperan preĝon en

kiu ŝi faris paralelon kun ventumilo, kiu povas aŭ enkonduki en ĉambron novan, freŝan aeron aŭ nur kirli malnovan eluzitan, preskaŭ senoksigenan aeron. Ĉu ni vere enkondukas en nian komunumon freŝan aeron aŭ nur kirlas malfreŝan aeron? Ni kantis la kanton numero 153 (el la kantlibro Adoru) kun vortoj de la lasta strofo: „Formortas mondaj imperioj, sed Via regno kreskos plu. Al Vi sin cedos dinastioj, Venkinto estos Vi, Jesu´!“

**Merkrede**, la 9-an de aŭgusto, ni faris tuttagan ekskurson en la urbon Drezdeno. Tie nin akompanis loka esperantisto sinjoro Hofmann, membro de Esperanto-Asocio *Verein Saksa Svisio, r. a.*, kaj li montris al ni novan sinagogon kaj la Malnovan urbon.

Drezdeno (germane: Dresden) havas pli ol 530 milojn da loĝantoj. Ĝin dum la dua mondmilito, en la tagoj 13-a – 15-a de februaro 1945, anglousonanoj bombadis (la 14-an de februaro ili erare bombadis ankaŭ Pragon. Tiam 60 % de Drezdeno estis neniigita.


Ĉiĉeronado en Drezdeno /VP

Ni trarigardis Preĝejon de Virgulino Maria (Frauenkirche) kaj Katedralon de la Plejsankta Triunuo nomata Hofkirche (Katholische Hofkirche de heiligsten Dreifaltigkeit).

Petr Chrdle donacis al sinjoro Hofmann libron pri Preĝejo de Virgulino Maria. La libron de Jürgen Helfricht (ge: „Die Dresden Frauenkirche“) esperantigis Philippe Benoît kaj eldonis Petr Chrdle en sia eldonejo KAVA-PECH sub la titolo „La Drezdena Sinjorina Preĝejo.

Drezdeno estas signifa esperantista centro kun agema esperantistaro. En la jaro 1908 la urbo estis gastiganto de la 4-a Universala Kongreso de Esperanto, en kiu partoprenis 1368 kongresanoj el 40 landoj. En la sudorienta urboparto Leuben situas Zamenhofstraße. En la urbo funkcias Saksia Esperanta Biblioteko (Sächsische Esperanto-Bibliothek).

En la Katedralo estas enkriptigitaj katolikaj princoj kaj reĝoj de la gento Wettin. En speciala ujo troviĝas koro de saksia princo kaj pola reĝo Aŭgusto la 2-a la Forta, kies korpo ripozas en Krakovo (Pollando).

En Zwinger troviĝas Galerio Malnovaj Majstroj (Gemäldegalerie Alte Meister), Porcelana Kolekto (Porzellansammlung) kaj Matematika-Fizika Salono (Mathematisch-Physikalischer Salon).

Saksio apartenis al socialisma parto de Germanio, tial en Drezdeno oni povas trovi eksan kulturan domon kun fasado en stilo de socialisma realismo.

Germana loĝantaro ne tiel multe fumas, kiel loĝantoj de aliaj postsocialismaj landoj (ekz. Ĉeĥa Respubliko, Slovakio, Pollando, Hungario, Rumanio).

En varma tago estis agrabla promenveturo sur la ŝipo Leipzig sur Elbo.

**Ĵaŭde**, la 10-an de aŭgusto, okazis

Jarkunveno de KELI.

Posttagmeze Bengt Olof Åradsson prelegis pri homonimoj kaj Petr Chrdle prezentis novajn librojn. Vespere ni danke al Philippe Cousson povis ekscii multe pri protestantismo(j).



Ágnes Ráczkevy-Eötvös prelegas pri la testamento de Lutero /OF

Prelegoj kontinuis ankaŭ **vendrede**. Interesa estis la prelego de Ágnes Ráczkevy-Eötvös pri „Testamento de Luther“. Bengt Olof Åradsson klarigis al ni teorion de homaranismo de Zamenhof. Posttagmeze Petr Chrdle prelegis pri Reformacio en Bohemio kaj Moravio ekde la 14-a jarcento. Mia prelego „Mulieris Dignitatem“ („Pri Digneco de Virino“) temis pri encikliko de papo Sankta Johano Paŭlo la 2-a el la jaro 1988. Rezulto de la prelego estis arda diskuto, dum kiu Albrecht



Gabriella Stier prelegas pri ekslibrisoj /SG

Kronenberger proponis uzi la temon por iu venonta kongreso de KELI.

**Sabate**, la 12-an de aŭgusto, antaŭtagmeze prelegis Gabriella Stier pri ekslibrisoj. Dum la prelego, kiu al ĉiuj plaĉis, estis prezentitaj ekslibrisoj el kolekto de Julio Stier.

Posttagmeze ni sub la gvido de pastoro Wolfram Rohloff faris duontagan ekskurson. Ni komencis en vilaĝo Pobershau, en la galerio „Die Hütte“, kie troviĝas interesa ekspozicio de lignaj statuetoj. La aŭtoro Gottfried Reichel (nask. en la jaro 1925 en Pobershau) dum la dua mondmilito devis batali en Pollando kaj Hungario. Kiel militkaptito travivis la jarojn



1946-1948 en Grandbritio. Post reveno li okupiĝis pri skulptado el tilia ligno. Li kreis pli ol 400 statuetojn, precipe laŭ bibliaj motivoj. Tial li dum la jaroj 1949-1989 estis strikte observita de orientgermanaj socialismaj kaŝpolicanoj (STASI). En la jaro 1951 li edziĝis, havis tri infanojn. Lia edzino forpasis en la jaro 1994. Al mi precipe plaĉis lia statuaro „Adoro de Ora Bovido“. Krom bibliaj motivoj Gottfried Reichel dokumentis situacion en varsovia getto. Li skulptis judojn, kiuj tie devis loĝi, laŭ fotografaĵoj, kiujn alportis germanaj



De maldekstre Philippe Cousson, Gerhard Hofmann kaj Samuel Gaillard en la preĝejo /VP

soldatoj.

Post vizito de la galerio Wolfram Rohloff montris al ni belecon de Ercmontaro. Ni komencis sur la monteto Katzenstein (altitudo 713 m), de kie ni iris piede. Ni revenis vespere.

**Dimanĉe** ni partoprenis en ekumena diservo en evangelika-luterana preĝejo en Zeblico. Wolfram Rohloff kaj Philippe Cousson predikis. Agrabla estis renkontiĝo kun lokaj paroĥanoj antaŭ la preĝejo. Posttagmeze ni vizitis lokan Muzeon de la Patrujo (Heimatmuseum). Specialaĵo de la regiono estas mineralo, kiun en la jaro 1823 germana natur-sciencisto Alexander von Humboldt nomis serpentinito, „serpenta ŝtono“ (germane: Schlangestein). La mineralo estas griza aŭ nigra, taŭga por skulptado. Krom tio ĝi akumulas varmecon. Konante la mineralon el Serpentinita Stepo apud Mohelno en Ĉeĥa Respubliko, kie estas natura rezervejo de varmamantaj faŭno kaj floro, mi demandis, ĉu ankaŭ en ĉirkaŭaĵo de Zeblico troviĝas varmamanta floro. La respondo estis „jes“. Sur herbejoj kreskas multe da plantoj el la familio Daucaceae. Tial mi povis eksplikі, kial mi en montaro povis foti (apud nia kongresejo en Hüttstattmühle) varmamantan papilion *Papilio machaon*, kies raŭpoj evoluas sur la plantoj de la familio Daucaceae, ekz. sur karoto. Simple dirite: ekzistas la ĉeno „serpentinito – varmamantaj plantoj – varmamanta papilio“.

El la muzeo ni denove iris en la preĝejon, por aŭskulti koncerton de sinjorino Elisabeth Rohloff (soprano) kaj Ernst Leuze (orgeno).

Post la koncerto okazis adiaŭa vespero en ĝardeno de pastora domo en Zeblico.

ᴕ

Fotis:
VP = Václav Pospíšil
SG = Samuel Gaillard
OF = Oldřich Arnošt Fischer



Petr Chrdle (md) kaj Pavel Polnický (d) /VP





Maldekstre: Anton Kiefer
Dekstre: Christa Koz /VP


Endel Ojasild kun la nepo Joonatan /VP


Sieglinde Stamm /VP

Christiane kaj Norbert Karbe /VP




Ernst Leuze /VP


KANTOJ

Inter la «literaj» kantoj la plej konata verŝajne estas la vokanto (v-kanto). Sed ankaŭ la mokanto kaj la ŝokanto plaĉas al mi. Sendube la plej bela estas la akanto.

Ekster la nura alfabeto menciindas eble la iom strangaj lekanto kaj strikanto, sed certe la trikanto, parkanto, provokanto kaj vekanto.

Albrecht Kronenberger 2017-06-23

## Nova kantlibro — KANTU




Albrecht Kronenberger prezentis dum la kongreso sian noveldonitan kantlibron KANTU. Ĝi enhavas kaj kristanajn kaj nereligiajn kantojn en Esperanto. La kantojn Albrecht Kronenberger preparis dum multaj jaroj kaj nun finfine 388 kantoj estas kolektitaj en unu libro. Kelkajn kantojn vi jam renkontis en Dia Regno. /red

# La religia fido de la prasciencistoj

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

La antikvaj grekoj posedis teorion de evolucio. Ilia idol-kulto inkludis multajn diojn, sed ili kredis ke la universo ekzistiĝis hazarde. Kvankam la grekoj faris grandajn eltrovojn kaj progreson pri la scienco kaj la matematiko, ili ne povis eniri en la pordon de la moderna scienco. Kial ne? ĉar ili ne havis koncepton de la granda Kreinto, la Eternulo, Kiu desegnis kaj faris la tutan universon.

La Prasciencistoj de la moderna erao kredis je la Dio de la Biblio. Ili kredis ke Dio kreis ĉion laŭ logika maniero, kaj ke ili povus eltrovi la sekretojn de la naturo per logika esplorado. GALILEO, kiu pruvis ke la mondo rondiras la sunon, diris: "Ni pensas la pensojn de Dio, sekvantaj Lin." Tio estis la komenco de la moderna scienco.

Robert BOYLE, kiu vivis dum la lasta parto de la 17-a jarcento, estis pioniro je la ĥemio kaj la fiziko. Ĉiu lernanto en liceo studas pri la "Leĝo de Boyle": la scienca leĝo eltrovita de Boyle, kiu traktas pri la aerpremo, la temperaturo, kaj la volumeno de iu gaso.

$$P \propto \frac{1}{V}$$

Roberto Boyle estis fidela kristano kaj li donis multe da mono por fari tradukojn de la Biblio en diversaj lingvoj. Boyle estis unu el la fondintoj de la Reĝa Societo de Londono, unu el la unuaj sciencaj asocioj. Li lasis monon laŭ sia testamento por financi la renomajn "Prelegojn de Boyle", ĉar li kredis ke la scienco kaj la Biblio akordiĝas. Boyle diris ke la scienco estas religia tasko per kiu ni povas lerni pli pri la "metilerteco" de la Kreinto.


Isaac NEWTON eltrovis la leĝon de universala gravito kaj la tri leĝojn de movo. Li konstruis la unuan spegulan teleskopon. Newton faris esploradon pri la lumo kaj klarigis kiel la blanka lumo konsistas el diversaj koloroj. Li disvolvis infiniteziman kalkulon kaj faris ĝin grava fako de matematiko kiu ĝi estas hodiaŭ. Multaj sciencistoj ne scias ke Newton kredis al la Kreinto kaj kredis ke la Biblio estas vera. Li skribis pli multajn verkojn pri la Biblio ol sciencajn verkojn. Isaac Newton estas unu el la plej renomaj sciencistoj ĉar li



Maxwell 1831 – 1879

lernis per la Biblio ke la naturo montras la ordon kaj la inteligentecon de la Kreinto.

Albert EINSTEIN diris ke James Clerk MAXWELL faris pli grandajn kontribuaĵojn al la fiziko ol iu alia sciencisto krom Isaac Newton. Maxwell disvolvis komplikajn teoriojn kaj matematikajn klarigojn pri la fortoj en la universo. Maxwell faris progreson en la fakoj de termodinamiko kaj matematiko. Li vivis samtempe kiel Charles DARWIN. Maxwell skribis gravan verkon refutante la teorion de evolucio kaj montrante ke la teorio de Darwin estas kontraŭ-scienca. Li refutis ankaŭ per matematiko la teorion ke la suna sistemo evoluis el nubo de polvo kaj gaso. Ĉi tiu renoma sciencisto kredis ke Jesuo Kristo estas la Savanto kiun Dio sendis al la mondo por liberigi nin el niaj pekoj. Unu verko de Maxwell, trovita post lia morto, deklaras ke la motivo por lia laboro estis ke Dio kreis ĉion, kiel estas skribite en Genezo. Kaj ĉar Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, la scienca esplorado estas taŭga laboro por iu homo.


Newton 1642 – 1726/27

Matthew MAŬRY, la patro de la scienco de oceanografio legis en la Biblio (Psalmo 8:8) ke ekzistas vojoj en la maroj. Kredante ke la Biblio estas vera, Maŭry serĉis la vojojn en la oceanoj kaj eltrovis la grandajn marajn fluojn kiuj rondiras la mondon. Li skribis: “La Biblio, oni diras, ne estis skribita por sciencaj celoj kaj tial ĝi ne estas aŭtoritata pri aferoj de scienco. Mi petas pardonon. La Biblio estas aŭtoritata por ĉio kiun ĝi tuŝas. La fortoj rilataj al la fizika funkciado de nia planedo estas servistoj de Tiu Kiu faris ĝin kaj la Biblion.”

Louis PASTEUR sciis per la Biblio ke la vivo ne povas elveni el la ne-vivo. ĉar, li diris, la Biblio asertas ke Dio estas la Kreinto kaj la aŭtoro de la vivo. La scienca laboro de Pasteur fariĝis la fundamento de la moderna medicino, kaj de novaj teknikoj por konservi nutraĵon. La sciencaj esploradoj de ĉi tiu sciencisto, kiu kredis ke la Biblio estas vera, savis la vivojn de milionoj da homoj.

Ĉi tiuj sciencistoj kaj multaj aliaj sciencistoj kredis ke la plej bona aserto pri la origino de la universo troviĝas en la unuaj vortoj el la Biblio: “En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron” (Genezo 1:1). La psalmisto skribis: “La ĉieloj rakontas la gloron de Dio, kaj la farojn de Liaj manoj raportas la ĉiela firmaĵo” (Psalmo 19:1).

Se ni zorge rigardas la mirindaĵojn de la naturo, ni devas konfesi ke ekzistas la Kreinto. Per la Biblio, ni povas koni la Kreinton kaj ni povas ĝui Lian amon.

# Kristana unueco aŭ eklezia ekumenismo

Artikolo en Dia Regno 11/1966
Erik Carlén (1906 – 1986)

En Dia Regno antaŭ 50 jaroj



La jena artikolo estas reago de la tiama vic-prezidanto de KELI kontraŭ la decido havi ekumenan kongreson. Multaj pensoj en ĝi estas legindaj. Tio ne signifas ke mi samopinias pri lia konkludo. Atente ankaŭ legu la redaktoran noton, je la fino, de la tiama redaktoro Jan v Keulen. /Nuntempa redaktoro

Tuj antaŭ ol Jesuo iris por suferi la morton sur la kruco por repacigi la homojn kun Dio, li preĝis. En Joh. 17 ni povis legi lian preĝon. Ĝia temo estis inter alie la unueco: „Kaj mi preĝas ne nur por ili (= la disĉiploj ĉirkaŭ li), sed ankaŭ por tiuj, kiuj kredos al mi pro ilia *vorto;* por ke ili ĉiuj estu unu; kiel Vi, Patro, estas en mi, kaj mi en Vi, tiel ili ankaŭ estu en ni; por ke la mondo kredu, ke Vi min sendis. Kaj la gloron, kiun Vi donis al mi, mi donis al ili; por ke ili estu unu tiel same, kiel ni estas unu; mi en ili, kaj Vi en mi, por ke ili perfektiĝu en unu". Tiel kortuŝe la suferonta kaj mortonta Savanto preĝis.

Ĉu lia peto pri unueco plenumiĝis? Laŭŝajne ne! La kristanaj eklezioj disiĝis pro diversaj kaŭzoj. Unu estas malsimilaj dogmoj. Oni diverse interpretis la Vorton de Dio, faris el tio diversajn dogmojn kaj kredojn. Ofte tio okazis el profunda amo al la vero. Sed plej ofte la homa tradicio, grupegoismo kaj potencavido kaŭzis disiĝojn kaj splitiĝojn. Tiel estiĝis la nunaj eklezioj en la mondo kaj ni vidas la bedaŭrindan dividitecon de la kristanaro.

La moderna ekumenismo celas kunlaboron inter tiuj eklezioj kaj fine ilian unuiĝon. Multaj konkludas ke la preĝo de Jesuo Kristo kaj la ekumenismo havas la saman celon, unuiĝon de liaj disĉiploj. Do la moderna ekumenismo estas ĝojiga signo de vera kristanismo. Oni tial kun ĝojo bonvenigas ĉiujn signojn de kunlaboro inter diversaj eklezioj aŭ inter iliaj anoj, ekz. la kunlaboro inter KELI kaj la romkatolikoj. En la moderna ekumenismo oni vidas la plenumiĝon de la preĝo de nia Savanto.

Sed antaŭ ol senrezerve akcepti tiun ĉi opinion ni iom esploru kio estas kristana unueco kaj la celojn de la ekumenismo.

Jesuo Kristo ne preĝis pri unueco inter eklezioj. Li preĝis pri unueco spirita, inter homoj kredantaj al li *pro la*

*Vorto*. Kristo ne pensis pri eklezioj. Li eĉ ne fondis tiajn aŭ tian. Ĉu Kristo ne fondis eklezion aŭ ĉu liaj apostoloj ne fondis tian? Jes kaj ne! Liaj apostoloj laŭ lia instruo fondis ekleziojn en tute alia senco ol la vorto nun havas. Eklezio laŭ la lingvo Biblia estas:

1) la loka grupo de kredantoj kaj baptitoj
2) ĉiuj tiuj grupoj kune (la "universala eklezio").

Tiuj lokaj eklezioj en novtestamenta tempo neniam faris ian organizaĵon inter si kun episkopo aŭ estraro super ĉiuj lokaj eklezioj (komunumoj oni diras en la hodiaŭa lingvo). Ĉiuj lokaj eklezioj estis memstaraj, liberaj. Oni tutsimple ne bezonis organizan ligilon inter ili, ĉar Jesuo Kristo mem estis ilia gvidanto aŭ kapo. Li estis la ĉefo kaj gvidis per Sia Sankta Spirito kaj per spiritaj homoj. Se ekestis diverĝaj instruoj en diversaj eklezioj, tio ne kaŭzis splitiĝon kaj disiĝon. Per la Vorto kaj per vojaĝantaj instruistoj tiuj problemoj ordinare iom post iom solviĝis. La spirita amo cetere estis pli forta ol la teologiaj diversecoj. Alia fariĝis la situacio kiam la Sankta Spirito ne plu gvidis kaj oni komencis krei grandajn organizaĵojn inter tiuj lokaj eklezioj. Oni nun komencis nomi tiujn mondajn aŭ landajn organizaĵojn Eklezioj. Tiel oni iom post iom ŝanĝis la signifon de la vorto eklezio ke ĝi hodiaŭ plej ofte signifas ion alian ol en la Biblio. La rezulto el tiu evoluo estis ke tre ofte kiam nova teologia opinio venis aŭ kiam malnova Biblia vero aktualiĝis oni tuj estis preta fondi novan organizaĵon, novan Eklezion. Kaj tiel venis la splitiĝo en la kristanaron, evidenta kaj konservata ĉar oni enkondukis homajn organizaĵojn anstataŭ la simpla, libera Biblia, kie splitiĝo apenaŭ estus ebla. Ofte tiuj grandaj Eklezioj aŭ organizaĵoj havis monopolistajn pretendojn, kiel ekz. la Romkatolika. Tiel la Eklezioj ofte fariĝis potencavidaj religiaj trustoj, kiuj eĉ sange persekutis kristanojn, kiuj havis alian kristanan kredon. Kompreneble tio estas absolute kontraŭ la kristana amo kaj kontraŭ la instruo de Jesuo Kristo.

**La unueco, kiun celas la ekumena movado**

La ekumena movado kaj ĝia organo, la Mondkonsilantaro de la Eklezioj, unue celas religian kunlaboron inter la Eklezioj. En si mem tio estas bona celado, sed ĉu efektive bona aŭ malbona dependas de la kondiĉoj kaj la fundamento de kunlaboro. Ekzistas limoj de kunlaboro religia por kredantaj kristanoj kaj ankaŭ por la kristanaj organizaĵoj. Estas nature ke tia kunlaboro ne estas ebla kun personoj aŭ organizaĵoj, kiuj malkonfesas aŭ negas la fundamentajn kristanajn verojn. Se kristano havus tian kunlaboron, li perfidus sian Majstron, Jesuon Kriston.

Kiuj do estas la fundamentaj kristanaj veroj? Ili estas laŭ mia kompreno:

1) Jesuo estas Kristo, la solenaskita Filo de Dio (Fil. 2:9-11). Li estis krucumita kaj mortigita. Li estis entombigita sed releviĝis el la mortintoj. Li estas la Vojo, la Vero kaj la Vivo. Neniu alia vojo ekzistas, kiu kondukas al saviĝo, krom Jesuo Kristo.
2) Nur per kredo (fido) al Jesuo Kristo homo povas ricevi pardonon de siaj

pekoj (Ago. 10:43, Rom. 8:3, Efe. 1:7, Heb. 9:26, 1Joh. 1:7, 1Joh. 2:2, 1Joh. 2:12).

3) La Biblio estas la Vorto de Dio, la sola fundamento por niaj kredo, saviĝo kaj vivado kiel kristanoj.

Homoj ofte diras: La doktrinoj disigas. Ni laboru kune, ni preĝu kune malgraŭ la diversecoj en la kredo, kaj ni havos unuecon. Al tio mi volas meti la demandon: Ĉu la vero, la Biblia vero estu la fundamento de unueco aŭ ĉu ĝi estu ia institucio? La vero – nomu ĝin doktrino – ĝi estas de Dio al ni donita en la Vorto. La institucio estas kreita de homoj. Mi jam montris ke la Eklezio kaj la Eklezioj hodiaŭ estas institucioj. La Biblia eklezio ne estas institucio sed spirita organismo – grupoj de vivantaj kristanoj – sed bedaŭrinde ili tiel facile fariĝas institucioj.

Sed homoj komprenas la Veron diverse. Jes, kaj mi volas aldoni plej ofte sub influado de homaj, t.e. Ekleziaj, tradicioj. Tamen ni povas fiksi minimuman kristanan dogmaron laŭ la Biblio. Tion mi klopodis fari en la tri punktoj, kiujn vi ĵus legis. La elirpunkto en la celado al kristana unueco ĉiam devas esti la renasko (Tit. 3:5) kaj kredo al la Vero. Nur tiam estiĝas la Dia amo, kiu unuecigas.

En la ekumena movado tia, kia ĝi aperas en la Mondkonsilantaro de la Eklezioj, oni tamen volas krei unuecon ankaŭ kun teologoj kaj grupoj, kiuj negas la releviĝon de Kristo el inter la mortintoj. Ekzistas ja homoj, havantaj t.n. sciencan bibliopercepton. Tio signifas ke ili jam antaŭe scias kio *ne* povas okazi. Ili bone scias ke miraklojn Dio ne povas fari, do releviĝo de mortinto estas neebla. La Biblion ili ne rigardas kiel vorton de Dio sed kiel interesan historian evoluon de religio. Tio estas la fundamentaj trajtoj de la negativa teologio, ankaŭ nomata liberala teologio. La ekumenismo celas unuecon ankaŭ kun tiaj teologoj kaj klopodas fari kompromisojn inter ili kaj kristanoj resp. Eklezioj, kiuj kredas al la Biblio. Tiamaniere la kristana fronto sub influo de la moderna ekumenismo malfortiĝas. En la pensado ĉe multaj, Dio fariĝas ne persono sed nereala, nebula principo de bonvolismo. Kaj tiel oni malfermas la ekumenismon por nekristanaj religioj kaj anstataŭ prediki la savon de la animo oni predikas ian socialan evangelion absolute fremdan por vera kristanismo.

Kristanoj, t.e. homoj akceptintaj Jesuon Kriston kiel sian personan Savanton, ne povas havi unuecon kaj religian kunulecon kun tiaj teologoj, kiuj malkonfesas la fundamentajn verojn de la Biblio. Ili ankaŭ ne povas havi kristanan unuecon kun Eklezioj, grupoj aŭ homoj, kiuj metas ion aŭ iun apud Dio kaj Jesuo Kristo. Tio estas idolaneco, kaj vi scias kiel severe la Biblio kondamnas idolanecon. Aŭ se oni metas ion apud Kristo oni diras ke Li aŭ tio, kion Li faris, ne estas sufiĉa.

Sed la moderna ekumenismo celas religian kunlaboron kaj unuecon ne nur kun nekristana, malkonfesa kaj negativa teologio. Ĝi ankaŭ volas unuecon kun idolaneca Eklezio, kie oni apud Dio kaj Lia Filo ankaŭ adoras la virgulinon Maria, sanktulojn kaj relikvojn.

Tie ĉi necesas parentezo: Mi povas

kompreneble havi kunlaboron human-ecan, kulturan, politikan k.t.p. kun ĉiaj homoj egale ĉu ili estas romkatolikoj, islamanoj, oomotanoj, budaistoj aŭ ate-istoj. Sed kristanan unuecon mi nur povas havi kun kristanaj, t.e. homoj akceptintaj Jesuon Kriston sur la funda-mento de la Biblio. Vasta kunlaboro *homeca* estas ja ankaŭ la ideo de esperantismo.

Sed ŝajnigi unuecon kristanan sur fundamento, kiu ne estas kristana aŭ biblia, estas nenio alia ol mensogo, trompo aŭ memtrompiĝo. Nur la Vero de la Biblio povas esti la fundamento de kristana unueco. Mi ripetas tion! Rimarku ankaŭ kiel severa la Biblio estas kontraŭ erara doktrino. Legu Mat. 24:24–46, Ag. 20:28–31, 2 Kor. 11:13–25, 2 Joh. 10–11. Jen vi renkontas ion alian ol niajn sentimentalajn molaĉajn kaj falsajn idealojn pri unueco. La unuigita mondeklezio, pri kiu oni revas, eble iam povas servi al Antikristo.

Pro la opinioj esprimitaj tie ĉi, mi estis kontraŭ la komuna kongreso de KELI kaj la romkatolikaj esperantistoj. Mi dissendis cirkuleron pri tio al la estraranoj kaj aliaj. Multaj skribis afable al mi, kaj mi kore dankas al ĉiuj, al kiuj mi persone ne povis respondi.

Pro tiu decido de KELI havi komunan kongreson kaj komunajn religiajn aranĝojn kun la romkatolikoj mi forlasis la estraron de KELI, paŝo kiu estas konsekventa kaj natura. Mi tamen bedaŭras ĝin, ĉar mi dum jaroj lernis ami nian evangelian kristanan movadon, nian KELI, kie mi antaŭe trovis la veran ekumenismon. Ĝi estas la spirita amo inter frato kaj frato malgraŭ membreco de diversaj Eklezioj, malgraü ofte diversaj opinioj pri kristanaj dogmoj.

ଓ

## Redaktora noto (J. van Keulen)

Kun ĝojo mi prezentas al vi verkaĵon de nia vicprezidanto Eric Carlén. Kun ĝojo, ĉar mi en mia ĝisnuna redaktora laborperiodo ĉiam kun envio memoris pri la tempo kiam frato Carlén verkis tiom da legindaj artikoloj.

Intence estas skribita ”nia vic-prezidanto” ĉar mi ne scias pri abdiko kaj dubas ĉu la estraro ricevis oficialan leteron tiurilate. Estus treege bedaŭrinde, se frato Carlén forlasus sian lokon, ĉar tio signifas malfortigon de la estraro.

Sendube oni ĝenerale konsentas kun la enhavo de la artikolo kaj forte substrekas ĝiajn principojn. Tamen povas ekzisti diferencaj opinioj, kie frato Carlén skribas pri rom-katolikoj. La verkinto verŝajne pretervidas, ke KELI estas nek eklezio, nek intertraktas kun iu ajn eklezio. La samon ni povus diri pri I.K.U.E. Sed ni deziras renkonti homojn, homojn kiuj konas tre intime Kriston, kiuj troviĝas ne nur inter tiuj, kiuj nomas sin evangelianoj, sed ankaŭ inter rom-katolikoj. Mi esperas renkonti ankaŭ en Limburg/L. kristanojn, kiuj konscias pri la savo en Jesuo Kristo.

Volonte mi akceptas opini-esprimojn, por kaj kontraŭ la Carlén-a, por publikigo en Dia Regno. Bonvolu verki nepre koncize!

ଓ

# Ekumenaj renkontiĝoj dum la 102a Universala Kongreso de Esperanto en Seulo, Koreio

Raportas Benata HENGSTMENGEL-KOOPMANS, NL

Dimanĉon la 23an de julio 2017 okazis Ekumena Diservo en la Rom-Katolika preĝejo Imundong, je promendistanco de la kongresejo en Seulo (vidu bildojn sur fronta paĝo).

Gvidis kaj predikis Pastoro Leif Nordenstorm el Svedio. Bibliotekstoj el Jeĥezkel 36:25-27 kaj la Dua Epistolo de la apostolo Paŭlo al la Korintanoj 5:14-20 estis legataj de interalie Maria Beloševic′ el Kroatio. La orgenon ludis blinda samideano, kiu ankaŭ akompanis la komunan kantadon. Partoprenis kelkdekoj da kongresanoj el diversaj konfesioj.

Mardon la 25an de julio okazis IKUE-KELI kunveno en la kongresejo, gvidita de Maria Beloševic′, kun helpo de Leif Nordenstorm, kiu legis el la Biblio kaj kiu kun la ĉeestantoj preĝis 'Patro Nia'.

Maria rakontis pri la aparte organizitaj IKUE-kongresoj kaj KELI-kongresoj kaj pri la Komunaj Kongresoj. Fakte la unua Komuna Kongreso okazis en 1968 antaŭ 49 jaroj en Limburg/Lahn, Germanio. Benata Koopmans rakontis ke ankau ŝi kun siaj gepatroj kaj gefratoj partoprenis tiun kongreson.

Maria nomis diversajn retpaĝarojn, inter alie http://KELI.CHEZ.COM kaj www.IKUE.org. Benata rakontis pri la ebleco legi la 'Preĝoj por ĉiu tago', verkitaj de ŝia patrino Jelly Koopmans-Schotanus, en la retpaĝaro de Kristanaj Fontoj: www.fontoj.net sub Spiritaj impulsoj. ☙



IKUE-KELI-kunveno gvidata de Maria Belošević kun Leif Nordenstorm kaj foto de la ĉeestantoj, kie aperas en la dua vico/dua persono de maldekstre: la japana KELI-ano Yanagi Kozaburo.



# Kristanoj en la nuna malagasa socio

## Intervjuo kun Pastoro LAZANDRAINY

Intervjuis FIDILALAO F. Henriel, Malagasio

Pastoro Lazandrainy Martin aĝas 43 jarojn kaj instruas la Novan Evangelion en la porpastora trenejo en Ivato Antananarivo. Li estas konata pro sia sincera kaj eĉ baston-frapa predikado en la Reformita eklezio protestanta FJKM. Sed li ankaŭ agadas ene de diversaj kulturaj kaj bonfaraj asocioj. El tiu intervjuo videblas la maniero de malagasaj evangeliistoj konsideri la vivon kaj la Evangelion.

**Kial homoj bezonas religion** ?
Multas la respondoj. Se temas pri biblia respondo, ĉar ni estis kreitaj de Dio laŭ Lia bildo cele al rilatado kun Li. Tio signifas ke Dio mem metis en nin tiun soifon rilati kun Li. Kaj se respondi aliamanere, multas la kialoj ĉar homo sentas kaj konscias sian limon, timo superas lin, dubo regas lin tiel, ke li estas devigata serĉi alian potencon je kiu sin apogi: iuj adoras idolojn, iuj aliaj kultas pri si mem kaj aliaj ceteruloj fidas je scienco k.s. Fakte, Dio kreis nin laŭ Sia bildo kaj Li metis en ni viv-igan spiron, do la Di-spirito troviĝas en ni kaj instigas nin serĉi Dion.



**Kiel kristanoj devas sinteni sin de la nuna moderna mondo** ?
Trafa demando kaj jen ĝuste ni devas pripensi pri tio, kion diras la Biblio. Ĉiuokaze, la Biblio ĉiam malkovras al ni la volon de Dio. Kaj tiu volo de Dio, ĉu dum la geneza epoko, ĉu apokalipsa aŭ dum la vivo de Jesuo, tiu dia principo nepre ne ŝanĝiĝas. Ke oni vivas en moderna epoko, tio ne ŝanĝas la volon de Dio. Tra la Historio, oni ĉiam devas serĉi Dion, timi Lin, ami Lin kaj ami sian samspeciulon. Tamen, fronte la modernismon k.s., iuj kristanoj vivas pli malfacile ol iuj samreligianoj liaj. Sed la tasko de ĉiuj kristanoj, sub la gvidado de la Sankta Spirito estas peti de Dio saĝon por ke ili estu kapablaj bone sin konduti en la vivo.

**Kiel la homoj konsideras vian rolon en la ĉiutaga vivo** ?
Tio dependas de la loko kaj de la socio en kiu ni vivas. Tamen por ni Mala-gasoj, pastoro daŭre havas rolon ĉar la homoj konsideras lin/ŝin kiel Raiaman-dreny(1), portanton de espero al ili, precipe se li/ŝi vere sintenas kiel pastoro, t.e. ne obei al mono, nek al profito, nek al honoro. Kaj se oni vere pretas sinteni kiel Di-servisto, vi iĝos Di-kunlaboranto.

**En mizera lando kiel Malagasio, ĉu ankaŭ la kristana eklezio partoprenas en la taskoj plibonigi la ĉiutagan vivon de la loĝantoj** ?
Ĝi ja partoprenas en tio! Prediki la Evangelion celas ne nur la animon sed tuŝas ĉiujn vivflankojn. La Evangelio ja koncernas ĉiujn homojn kaj la tutecon de la homo. Tuŝi ĉiujn homojn sen seksa distingo, pri tiu nuna temo pri "genro" la Biblio jam akiris fruan elpaŝon, ĉar la Biblio kaj la kredo ne metas diferencon inter homoj malgraŭ tio, ke restas iaj spuroj de kulturo en la Sankta Skribo. La eklezio devas okupiĝi ne nur pri ĉiuj homoj sed ankaŭ pri la homo kiel korpo, spirito kaj animo. Prediki la Evangelion ne nur por elsavi la animon sed ankaŭ roli efektive ene de la socio. Eble estas tamen eta apartaĵo se paroli pri kelkaj flankoj de la vivo ĉar pri iuj temoj la eklezio opinias ke ili estas propra respondeco de la registaro. Ekzemple, la eklezio devas multe partopreni en la kampo de edukado, konsciigante la homojn pri la medio-protektado. Ni supozu nur ke se bone predikita estas la Evangelio kaj se ĝi trafas la koron de la homoj, post iom da tempo ne plu bezonatos policanoj ĉar la homoj timos Dion, ili kapablos labori, ili respektos la leĝon kaj scios kiel ili sintenu. Rigardu Jesuon, kiu ne nur predikis sed ankaŭ nutris homojn, kaj ne nur tion, lia prediko celtrafis ankaŭ la tiaman politikistaron kaj regantaron.

**Multajn dankojn al vi pastoro**
Ne dankinde.

ଓ

---

1. *Raiaman-dreny:* laŭlitere patro kaj patrino. Temas pri koncepto malagasa, kiu donas gravan rolon al plejaĝuloj, gepatroj kaj aliaj gravuloj en la socio. La Raiaman-dreny provizas konsilojn, helpojn, benon kaj eĉ punojn se necese. Ili estas ankaŭ la morala garantio de la socio.

---

## Laste aperis ...




Niaj du konatuloj Julia Sigmond kaj Ed Borsboom eldonis kolektlibrojn de jam aperintaj artikoletoj. Julia Sigmond kolektis 39 diversspecajn pritraktojn de grandaj kaj malgrandaj pensoj kaj vivokazaĵoj en *Fronto aŭ dorso*.

Krome, Julia Sigmond eldonis poemon *Doloro* apud kiu aperas tradukaĵoj en 54 lingvoj.

Ed Borsboom en *Kie miozotas memor'* kolektis portretojn de 31 esperantistoj.

El ambaŭ kolektlibroj unuopaj artikoletoj jam aperis en Dia Regno. Venos recenzoj. ଓ

# P R O T O K O L O

de la jarkunveno 2017 de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) en Hüttstattmühle 10. 8. 2017, partoprenis 20 kelianoj, el tio 7 estraranoj

1. **Malfermo**
Prezidanto Philippe Cousson malfermis la jarkunvenon.

**2. Elekto de kunprotokolantoj**
La proponitaj Oldřich. A. Fischer kaj Václav Pospíšil estis elektitaj.

**3. Akcepto de tagordo**
La tagordo de la jarkunveno publikigita en DR estis aprobita.

**4. Komunikoj**
Salutojn sendis gefratoj el Nederlando, Svisio, Ĉeĥio, Ĉinio, Hungario, Svedio, Usono, Rumanio kaj Germanio.

**5. Funebra memorigo**
Forpasintaj kelianoj: Astrid Hanke, Mariane Frank kaj Erich Schauz el Germanio, Arne Lundkvist el Svedio, Leen Hordijk kaj Wim Baris el Nederlando estis honorigitaj per unuminuta funebra memorigo.

**6. Sekretaria jarraporto**
Revuo Dia Regno estas eldonata en 280 ekzempleroj kaj estas dissendata al 35 landoj (19 eŭropaj kaj 16 ekstereŭropaj landoj) . Estas necese ordigi abonliston (Pavel Polnický).

**7. Kasista jarraporto**
Tutjara raporto de la kasistino estis publikigita en DR 3/2017, paĝoj 64-67. La kasistino Ágnes Ráczkevy-Eötvös informis, ke la elspezoj 3.348,65 superas enspezojn 2.751,94. La venontan jaron 2018 oni devos decidi, ĉu altigi membrokotizojn kaj kiel malaltigi elspezojn. Pavel Polnický aldonis, ke preskaŭ 60 personoj ne pagis kotizon en la jaroj 2015 kaj 2016. Samtempe ekestis alvoko al varbado de novaj kelianoj.



La estraro dum jarkunveno. Fotis Samuel Gaillard

**8. Raporto de la kaskontrolantoj**

Karl-Heinz Schaeffer kun Norbert Südland certigis nin, ke la kontado estas gvidata modele kaj ĉio estas en la ordo. Siegfried Krüger helpas ĉe ilia laboro.

**9. Diskuto kaj akcepto de la raportoj**

Ágnes Ráczkevy-Eötvös diris, ke kalkulita estas nur certa mono. Petr Chrdle proponas, por ke nova membraro pagu pli altan kotizon. Bengt Olof promesis, ke baldaŭ pagos ne senditan monon de svedoj, same Samuel Gaillard por francoj. Wolfram Rohloff proponas pli strikte urĝi nepagitajn membro-kotizojn. Ágnes Ráczkevy-Eötvös atentigis, ke parto de membraro estas malsana aŭ maljuna kaj pro tio ne povas plu pagi. Wolfram Rohloff rekomendas ĝustatempe nuligi tiujn membrojn el listo.

Ĉiuj raportoj estis aprobitaj.

**10. Budĝetoj**

La budĝetoj estis publikigitaj en la DR 3/2017, p. 66-67. Post la klarigoj ili estis akceptitaj.

**11. Raporto de la redaktoro**

Laŭ la teknika flanko estas DR duonkolora kun la kolora koverto. Kun tio estas ĉiuj kontentaj. Laŭ la enhavo en ĝi estas artikoloj kaj teologiaj, kaj pli simplaj. La redaktoro bezonas pli da kunlaborantoj kaj kontribuoj de la legantoj. La malnovaj numeroj de DR oni povas legi en la retpaĝo Fontoj.net

Li dankas al Éva Farkas-Tatár kaj Pavel Polnický pro la rapida kaj preciza tralegado kaj kontrolado de tekstoj.

La raporto de redaktoro estis aprobita.

**12. Estrarelekto**

Ĉi-jare finiĝas la 3-jara deĵorperiodo de Pavel Polnický, Václav Pospíšil, Ágnes Ráczkevy-Eötvös kaj Siegfried Krüger. Ĉiuj estas reelekteblaj. Ĉiuj estis akceptitaj unuanime.

**13. Kongresplanoj - 2018**

La jarkunveno aprobas proponon organizi ekumenan kongreson 2018 en Poděbrady, Ĉeĥio de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 2018. Ĝi estis akceptita de IKUE estraro. Pavel Polnický preparis aliĝilon, ĉeestantaj membroj povas tuj aliĝi kaj antaŭpagi.

**14. Proponoj kaj sugestoj de la membroj**

Bibliaj tagoj okazos de la 7-a ĝis la 11-a de marto (merkredo – dimanĉo) 2018 en Mainz, Germanio.

Wolfram Rohloff atentigis pri alta aĝo de plimulto de membroj kaj neceso pensi pri serĉado de pli junaj membroj. Petr Chrdle diris, ke junularo ne kutimas legi paperajn informojn, sed observas ekranon. Pro tio estas uzeblaj socialaj retoj kiel Ipernity kaj Facebook.

**15. Fermo**

Philippe Cousson finis la jarkunvenon.

Protokolis:
Oldřich.A.Fischer kaj
Václav Pospíšil

# Leen Hordijk

## 22 oktobro 1926 -24 junio 2017



Leen (oficiale Leendert) naskiĝis en Roterdamo. En la jaro 1972 pro televida kurso pri Esperanto kolektiĝis ĉe Jan van Keulen, la tiama redaktoro de Dia Regno, grupeto en kiu ankaŭ Gerrit Berveling partoprenis. Ili ĉiuj loĝis en Vlaardingen. Jan enkondukis la kursanojn en la gramatikon kaj praktikon de Esperanto kaj prezentis ankaŭ la esperanto-literaturon. Post la fino de la kurso daŭrigis kelkaj entuziasmuloj per la traduko en Esperanton el la Nederlanda libreto 'La virino en la Judismo" el la serio "Voĉoj Kristanaj" de Gerrit.

Krom membro de KELI kaj KUNE Leen ankaŭ membriĝis al UEA kaj NEA (Nederlanda Esperanto-Asocio).

Mi konatiĝis kun Leen kaj lia edzino Sietske dum la Ekumena Kongreso en la Nederlanda urbeto Dalfsen en la jaro 1981. Kiel membro de la Loka Kongresa Komitato li plenumis la kasistan taskon kaj same ankaŭ en la sekva KELI-kongreso de Burgh-Haamstede, denove en nia lando. Baldaŭ li postsekvis la francan kasiston en KELI.

Leen estis profesia kontisto kaj ankaŭ instruis komercan kontistadon en vespera lernejo. Krome li kontrolis dum iom da tempo la financojn de UEA.

La geedza paro partoprenis en multaj KELI- kaj Ekumenaj Kongresoj. Sietske amoplene zorgis pri lia bonfarto ĉar liaj korpaj problemoj daŭre pligrandiĝis.

La 24-an de junio forpasis la muzikema, sprita, engaĝita patro, avo kaj praavo. Ni perdis entuziasman amikon kaj esperantiston.


Ni sincere kondolencas al Sietske kaj la parencojn.

*Els van Dijk-Kuperus*

Mi dankas Siegfried Krüger kaj
Gerrit Berveling por kelkaj informoj.

# Serĉi, demandi

## SUCHEN UND FRAGEN




SUCHEN UND FRAGEN • nGL 457 • M (Aube nouvelle): Jo Akepsimas • © Studio SM Varades • germana T: Diethard Zils • © tdv-Verlag, Düsseldorf • E: Albrecht Kronenberger 2017-05-18